# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 3 2021

## ABROGITA LA *PATRINAN LEĜON* DE BOLIVIO

La bolivia Prezidento, Luis Arce, definitive rezignis la aprobon de la leĝo 1386, dise konata kiel *"Patrina Leĝo"*. Debatoj pri tiu leĝo en la Parlamento de tiu sudamerika ŝtato provokis ĝeneralan strikon, amasajn manifestaciojn kaj surstratajn blokadojn tra la tuta teritorio.

La nomo de la leĝo vere estas *Leĝo pri nacia strategio cele la rifuzon de kontraŭleĝaj profitoj kaj de la financado de la terorismo*. Laŭ diversaj sektoroj de la bolivia socio, ĉefe profesiuloj kaj komercistoj, ĉi tiu leĝo celas kontroli monon kaj havaĵojn de la enloĝantaro fare de la registaro. Tiel, sufiĉus ke la ŝtata administracio kvalifikus kiun ajn propraĵon, kiel profiton atingitan dank'al kontraŭ-leĝaj agadoj, por kontroli ilin nome de la ŝtato.

Se tiel, en Bolivio oni timas, ke la registaro, nur pro suspekto, povus senigi iun je ties havaĵaron sen nepra juĝa proceso. Kelkaj organizoj eĉ parolas pri strikta kontrolo de la registaro kaj persekutado kontraŭ politikaj rivaloj, ĉi lastaj povus perdi sian tutan monon kaj havaĵojn, se tion ordonas la registaro.




*Ne Leĝo 1386*

Ankaŭ advokatoj, ĵurnalistoj kaj eĉ religiuloj rifuzis tiun eblan leĝon, pro la fakto, ke ĝi iasence nuligas la rajton pri profesia sekreto.

Pro ĉi ĉiuj protestoj la Prezidento Luis Arce petis al la Parlamento finigi la debatojn pri tiu nova leĝo. Laŭ li sciigis: Bolivio ne deziras pliajn angorojn aŭ ne-necesajn problemojn. Sindikatoj kaj profesiaj asocioj nuligis tiam la alvokon por ĝenerala striko.

# Vorto de la Semajno

**Aĉeti** (tr): Akiri kiel propraĵon per pago de mono.

**Elaĉeti:** Pagi por liberigi iu el kaptiteco.

*Ĉe la Romanoj la sklavoj povis sin elaĉeti.*

**Foraĉeti:** Aĉeti kiel eble plej multajn varojn, kaj poste per reteno maloftigi ilin sur la merkato.

*La muelisto foraĉetis ĉiun tritikon en la regiono.*

**Retroaĉeto:** Fino de longedaŭra vivasekura poliso, fare de asekurito, antaŭ la fino de la limtempo.

*Mi bezonis monon, pro tio mi retroaĉetis mian vivasekuran polison.*

**Subaĉeti:** Delogi per mondonaco kaŝita.

*La juĝo kondamnis lin, ĉar iu subaĉetis atestanton.*



Aĉeti domon per pago de mono

---

Ne forgesu rekotizi por la jaro 2022. La kotizo al IJEA estas 7 aŭ 14 eŭroj, laŭ la lando kie Vi loĝas, pagebla al la UEA-konto: ejax-r
Pliaj detaloj ĉe: https://www.esperantojuro.org/i-j-e-a/kio-estas-ijea/membro/

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. sciigi pri tio al ni.

---